

# HAKIS


JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:  
F-INO ITZIAR ARTECHE

**Nro. 80 - 1973**


Str. Barrencale Barrena, 7 - 1.<sup>a</sup>  
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5





# ENHAVO

Jaro 1973 <sup>a</sup> . . . . .	.1
Marista vivo . . . . .	.2
Ĉu kuracistoj . . . . .	.3-4
Matenmango . . . . .	.5
ĈU VI KONKURSOS ? . . . . .	.6-7
Notoj . . . . .	.7-8
La kartludantinoj . . . . .	.9-10
Koresponda Servo . . . . .	.11
Bilanco . . . . .	.12





Estimataj geamikoj:

Iluzie ni gratulas vin en la unua revuo de ĉi-tiu jaro, kiu tiel grava promesas esti por la vivo de HEJS.

Cijare, ni ŝanĝos ĝian strukturon, ni intencos renovigi la agadon. Ni pripensis multajn projektojn kun novaj ideoj. Pere de la ĉijaraj revuoj ni informigos vin ĉiujn. En la jena kiun vi legas, kiam vi finos la legadon de tiuĉi mesaĝo, vi povos fotiumi la paĝojn kaj rimarkos la ekzemplon pri ĉi-tiuj revoluciaj ideoj. Ĉu plaĉas al vi la ideoj ?

Sed por ke HEJS antaŭiĝi, ne nur la estraro estas kiu devas priokupiĝi, estas necese la apogo de ĉiuj. Kaj kion pli diri?, ankoraŭ restas multon por fari, dum ni marŝas kaj plenumas niajn celojn, en la horizonto aperas aliaj idealoj, kiuj ku raĝigas nin, kaj tiu emo por la batalado kiu karakterizas la HEJS-anaron.

Koran saluton.



Sur la ŝip' maristo sole sentas sin.  
Dum en la haveno knabin' atendas lin.  
Noktojn plenguajn spertis li  
en la haven' kun ŝi, Lilly.  
....kun ŝi, Lilly Marlene.....

En trankvil' li staras, kaptas lin la rev'.  
Tre mallonge daŭras ĉar vokas lin la dev'.  
Tamen la bildon vidis li  
de bela hom' , de ŝi, Lilly,  
....de ŝi, Lilly Marlene.....

Sed post kelka tempo hejmeniras ŝip'.  
Ĉe maristaj lipoj fidele estas pip',  
sed en haven' li ŝanĝas ĝin  
kun lipoj dolĉaj de knabin'  
....de ŝi, Lilly Marlene.....

Kiam ŝip' atingas lokon en la nord'.  
Salutante staras knabino ĉe la bord'.  
Cirkaŭbrakante kaptas li  
knabinon karan, ŝin Lilly.  
....jes ŝin, Lilly Marlene.....

Kai L. Henriksen

# ĈU KURACISTOJ AŬ ..... ?




Estis dimanĉo, subite la infanino ( 2jara) malsaniĝis, ŝi havis altegan febron kaj suferis fortajn konvulsiojn, kompreneble, ŝia patrino ege nervozis kaj rapide kunportis ŝin al la plej proksima kuracisto. Post 2-minuta ekzameno li diris: " Mi ne scias certe kio okazas al ŝi; estas pli bone ke vi urĝe portu ŝin al la hospitalo, kie oni havas pli bonajn aparatojn kaj ili povos ekzameni ŝin pli bone ol mi". Do, li solvis nenion, li ne trafis kian malsanon ŝi suferis, sed tamen li enspezis al la patrino 200 pesetojn pro sia "laboro" .

En la hospitalo ekzamenis la infaninon dum pli ol duonhoro; oni aŭskultis al ŝi tutan korpon; la oŝtojn, gorgon, kapon ktp. kaj rapide diagnozis la malsanon kaj atakis ŝin. Tamen, la patrino devis pagi nenion.

Estas granda diferenco inter veraj kuracistoj kaj nur simplaj enspezistoj. Oni ne povas pretendi ke kuracistoj estu kvazaŭ pastroj, sed ke ili almenaŭ estu pli humanistaj, jes, ke ili ne traktu la malsanulon kvazaŭ maŝino, aŭ nur pensante pri lia bankkonto.

Se vi estas malsana hejme kaj vi telefonas kuraciston por ke li vizitu, ofta demando estas: ĉu vi estas privata aŭ apartenas al la asekuro ?, kaj mi min demandas : ĉu tio gravas ?, ĉu, ne estas malsanulo, homo, kiu lin bezonas ?, ĉu tiel gravas ke li estu privata aŭ asekurata?. Por veraj kuracistoj, ne, sed por simplaj enspezistoj, verŝajne jes. Se vi estas privata, la kuracisto (enspezisto) estos en via hejmo, 5 minutoj post via telefonalkvoko, sed, se vi estas asekurata, li eĉ receptos vin telefone.

Estas hontiga ke en civilizita socio, ekzistu malsanuloj, homoj kiuj bezonas operacion, sed ili restas malsanaj, neoperacitaj, nur ĉar iliaj moneblecoj ne estas tiel "altaj" kiel la honorarioj, de



tiu kuracisto kiu povus resaniĝi, operaci ilin.

Jes, ankaŭ en la socia asekuro estas bonaj kuracistoj, kial ne, sed, ĉu estas eble, bone aŭskulti malsanulon kiam oni devas ekzameni 30 - 40 homojn dum 2 horoj ?. Laŭ la statistikoj, kuracistoj aparte nantaj al la socia asekuro, devas vidi malsanulon, ĉiu 7 minutoj, sed mi pensas ke multfoje tiu tempo ne estas tiel longa. Tiamaniere ne estas strange ke kuracisto receptu al vi, ekzemple, pastelojn por la kapo, kiam al vi doloras la piedojn.

Ne mankas eĉ la homoj, kiuj devas havi sian asekuran kuraciston, ankaŭ private (kompreneble pagante aparte) por meriti de li pli bonan atenton kaj rajti viziti lian privatan konsultejon, kie li havas pli modernajn aparatojn .

MARI-JOSE



HUMORA  
ANGULO

ERIAS \*



# LA MATEM. MANĜO J. Prévert

Li enverŝis la kafon  
 En la tason  
 Li enverŝis la lakton  
 En la tason de kafo  
 Li enmetis sukeron  
 En la kafon kun lakto  
 Per la kulereto  
 Li kirlis ĝin  
 Li trinkis la kafon kun lakto  
 Kaj lasis la tason  
 Sen alparoli min  
 Li bruligis  
 Cigaredon  
 Li formis rondojn  
 El la fumo  
 Li ŝutis la cindron  
 En la cindrujon

Sen alparoli min  
 Sen alrigardi min  
 Li starigis  
 Li surmetis  
 Sian ĉapelon sur sian  
 kapon  
 Li surmetis sian pluv-  
 mantelen  
 Ĉar pluvis  
 Kaj li foriris  
 Sub la pluvo  
 Sen iun vorton  
 Sen alrigardi min  
 Kaj mi prenis  
 Mian kapon inter miaj  
 manoj  
 Kaj ekploris

El la franca: Atjkus Bukiŝ.

Jacques PREVERT (1909). Franclingva belga poeto. Liajn poemojn - en kiuj la surrealistika influo kunestas kun poetika populismo - oni aperigis en jenaj kolektoj: PAROLES (1948); SPEKTAOLE (1951); LA PLUIE ET LE BEAU TEMPS (1955). Ĉefa trajto de liaj versaĵ verkoj estas ĝia nekonformisma, kontraŭburĝa, mokema kaj renversema enhavo, kune kun ĝia indigno pro la mizero de la personoj kaj pro la triumfo de la hipokritado. Prévert ne estas hermetika. En siaj verkoj li parolas, rakontas kaj mal laŭdas sen subestimi nek la pitoreskan slangon, nek la obscenajn vortojn.

Li verkis ankaŭ dialogaron por filmoj.

La ĉi supra poeziaĵo estas publikigita en PAROLES. Galimard, eldonisto.

La estraro de H.E.J.S. dezirante dankpremi ĉiujn membrojn kiuj laboras kaj penas pro Esperanto, kreas konkurson, sur la jenaj bazoj :

- 1) Ĉiuj membroj de H.E.J.S. rajtas partopreni, sciigante nin pri sia partopreno pere de la vortoj : "POR KONKURSI", skribitaj en la letero.
- 2) Ĉiu beletra tasko devas esti originala. La artikolojn oni sendos kun fotografiaĵo (kiu povas esti ĵurnala aŭ revua tranĉaĵo), aŭ desegno, kiuj ilustros la temon. (Ĉio ĉi blanknigra).
- 3) **FORMATO:** Maksimume, vi okupos du paĝojn de nia revuo, enkalkulante fotojn kaj desegnojn.
- 4) **VALORIGO:** Oni valorigos la tekston, laŭ la kvalito de:
  - a) Esperanto (la plej grava por la valorigo)
  - b) La temo (libere elektita de vi)
  - c) La belaspekto de la tasko.
- 5) **PREMIOJ:** Unu konsistas el 1.000 Ptoj. kaj du el 500 Ptoj. Tamen la juĝantaro povos krei kelkajn subpremiojn.
- 6) **JUGANTARO:** Oni formas ĝin pere de:

1	Membro de la estraro de H.E.J.S.
1	" de la Bilbao'a grupo.
1	" de la grupo de Santander.
1	" " " de Barcelona.
1	" " " de Alicante.
- 7) **TEMPLINO:** Oni akceptos artikolojn ĝis la UNUA DE NOVEMBRO 1973, kaj la verdikto aperos en la lasta ekzemplero de nia ĉi jara revuo. La konkurso ĉiel havos verdikton, kiu estos neapelaciebla.
- 8) **HEJS** rajtas publikigi ĉiujn artikolojn ricevitajn, laŭvole.
- 9) Ĉiu kiu konkursosm ja libere akceptas la suprediritajn bazojn.



ĉu vi

## KONKURSOS ?



Ĉiuj el niaj membroj kiuj atingos varbi novajn membrojn por HEJS, ricevos belan donacon.

Po ĉiuj tri novaj membroj kiujn vi varbu, vi ricevos esperantan libron.

Kaj " ATENTU" po ĉiu nova membro vi ricevos unu numeron, kiu permesos al vi, - se ni ricevos pli ol cent novajn membrojn -, partopreni lotadon kies premio estos 5.000 pesetoj por ĉeesti E-Kongreson.

La lotado okazos la 23an de JUNIO - 1.973<sup>a</sup>. La gajnonto estos informita letere.

### LA ESTRARO

NOTO: Nia redaktorino S-ino. Carmen Navarro ĉesas en sia posteno pro laboraj kaŭzoj. Ni dankas al ŝi ŝian sindonemon. Nia nova ĉefredaktorino estas F-ino. Iĉiar Arteché, tre aktiva kaj laborema samideanino.

=====

### PAGO DE KOTIZOJ:


Ĉiuj kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon, bonvolu pagi ĝin al la koncerna delegito en sia urbo. Se ne ekzistas delegito bonvolu sendi ĝin al nia konto N<sup>o</sup> 332235 de la Banco de Vizcaya, sen-

dante al ni la duplikaton.

Memoru ke post la plialtigo, nia kotizo estas 100 pesetoj.

Kiuj ankaŭ estas membroj de HEF devas sendi la HEF-kotizon rekte al la Federacio.

LA ESTRARO



HEJS- membro.....170 Ptoj.

Gesinjoroj Mellado....100 "

Grupo Stelo de Paco... 50 "

Inst.Sind. de MALAGA..200 "  
(Sek. Esperanto)

Juan Azcuénaga..... 50 "



NIA

ESTRARO

Prezidanto :

S-ro. José Fariñas

Vic-prezidanto :

S-ro. Antonio Fariñas

Sekretariino:

F-ino. M<sup>a</sup> José Morán

Vic-sekretariino:

F-ino. M<sup>a</sup> Angeles Mielgo

Kasisto :

S-ro. José Miguel Fernández

Voĉdonantino kaj redak  
torino de HEJS-revuo:

F-ino. M<sup>a</sup> Iciar Arteche

Voĉdonanto :

S-ro. Miguel Angel Altuna

Voĉdonantino:

F-ino. Laura García

# La Kartludantinoj



Cu vi, moderna homo, kiu multe kaj konstante rapidas en la grandaj urboj, povas imagi areton de oldaj virinoj, kiuj trankvile ludas kartojn de la posttagmezo ĝis la sunsubiro, en amikeca rondo? .

Multaj kutimoj de la kastilaj vilaĝoj jam estas for, sed aliaj ankoraŭ restas aŭ almenaŭ ili ankoraŭ ne tute malaperis. El inter tiuj kutimoj men ciinda estas la kartludo, kiu antaŭe havis multajn adeptojn, ne nur en viraj rondoj, sed ankaŭ inter la virinoj. La viroj preferis kartludi en la kafejoj kaj la virinoj, dumvintre, ĉe iu el la kunludantinoj kaj somere ili kartludis surstrate. Nuntempe la junularo ne sentas emon al tiu distraĵo, distraĵo, kiu iufoje fariĝis vere malvirto kun malbonaj konsekvencoj por la hejma paco.

Nu, dum mia nunjara ferio en kastila vilaĝo mi ankoraŭ vidis tiun rondeton de kartludantinoj. En tiu ĉi mondo, plena de urĝo, kie la homo kuradas de unu loko al alia senhalte, kiam oni diras ke liberan tempon oni trovas por nenio en tiu kastila vilaĝo areto de virinoj sidadas en la plej granda senzorgo ĉiutage dum 5-6 horoj por kartludi.

La kartludo estas nomata - BRISCA - kies tradukon Esperanton mi ne kapablas fari. Ordinare la ludo okazas inter ses kunludantinojn. Tri el ili estas ludkamaradinoj kaj ilia nura celo estas venki la aliajn tri kunludantinojn. La ludaĵoj estas tre diskutataj, kvankam dum la kartludado devas regi impona silento. Vi imagu !!, ili ankaŭ vetas monon, ordinare dek centimojn po ludaĵo kaj eĉ estas la ebleco ke se iu kartludantino havas malbonan ŝancon ŝi malgajnas eĉ du pesetojn !! .

Cu ili estas feliĉaj en tiu medio?. Vi jam povas imagi ke jes. Somere, kiam ili ludas surstrate




apud muro, kiu ŝirmas ilin de la norda kaj freŝa vento ĉiutage blovanta je la sunsubiro, la feliĉo por ili estas kompleta.

Apud ili veturas tiuj modernaj kaj grandaj rikolmaŝinoj kiuj anstataŭas la homon de tiu peza laboro kiu ja estas la rikoltado de la tritiko. Jen la progreso, tiuj maŝinejoj ĉiam rapidante kaj brunte kontraste kun la trankvileco de alia tempo en kiu ne ekzistis tiom da komfortaĵoj, sed kiu ne volas cedi al la influo de nia moderna vivo.

Multaj el tiuj kartludantinoj havas filojn kiuj posedas aŭtomobilon, sed inviti veturi, ilin, per tiu moderna veturilo, tio estus preskaŭ ilin in sulti. Ne, ne -ili respondas- niaj kamaradinoj aten das nin, ni jam devas kunludi, ĝi estas la plej bona distraĵo por ni .

Ili ankaŭ havas filojn kiuj loĝas en grandaj urboj, ili jam povus loĝi, vivi kun la gefiloj, sed ne, ili preferas la trankvilecon de la vilaĝo, la rondon de la samaĝaj najbarinoj. Ili preferas kun sidante sur tiuj pajlseĝoj priparoli, komentarii la alvenon de tiu aŭ alia vilaĝano, kiu antaŭ kelkaj jaroj forlasis la vilaĝon. Ili preferas kartludi, kiel faris siaj patrinoj, patrinoj kiuj same kiel ili ankaŭ nomiĝis Cira, Patrocino, Eustaquia ktp... nomoj kiuj memorigas alian epokon.

La komparo estas pensinda, kiam la homo atingis la lunon, kiam ekzistas tiuj rapidegaj aviadiloj, kiam la progreso pasas tutapude de tiuj oldaj vironoj, ili preferas la kvietecon, la senzorgecon de pasintaj tempoj al la t.n. komfortaĵoj de la moderna vivo. Iam, unu el tiuj kartludantinoj diris al mi, kial vi, urbanoj tiom kritikis niajn kutimojn, niajn vilaĝojn, sed kiam vi havas momenton liberan, vi tuj kuras al niaj vilaĝojn kaj forlasis la urbojn, kial ?.



# KORESPONDA

# SERVO

PIOTR DUDKIN

BRZEG  
ul. Stoneczna 3/1

POLSKA



Li estas filatelisto kaj kolektas poŝtmarkojn pri te mo: sporto, floroj kaj birdoj. Nature, li volas inter ŝanĝi poŝt. kun aliaj filatelistoj.

Ankaŭ deziras korespondi..... ISTUAN SZALAI



SZEGED

Szeged - Rókus Stacio

HUNGARIO

25 jara, fervojisto, kun hispanaj gejunuloj. Li kolektas poŝtmarkojn, alumetetiketojn, etiketojn de ho telo, bildkartojn, portretojn de filmaktorojn, gaze tojn, magazinojn, prospektojn kaj ilustritajn broŝurojn ktp.

VLAHO DEMOVICH deziras korespondi kun hispan(o)ino. Lia adreso estas:

BUILDING TECHNICIAN

44 WELLESLEY ST. , SUMMER HILL

N. S. W. 2.130 - SYDNEY- AUSTRALIO



# 11

# BILANCO

A L 31. 12. 72 -

Gtos. imp. revista y mat. ofc.....	16.468,30	
Gtos. expedición rev. ....	3.277,80	
Importe pagado a HEF .....	1.320,—	
Capital (Saldo 31-12-71) .....		14.026,07
Cuotas .....		13.084,90
Beneficio Lotería .....		7.181,40
Donativos col. de HEJS .....		869,90
Intereses cta. cte. ....		50,48
Caja y cta. cte. ....	16.256,65	
Pte. de pago .....		2.110,—
TOTAL .....	<u>37.322,75</u>	<u>37.322,75</u>

Estimataj gesamideanoj:

La bilanco presentigas simple, laŭ vi povas rimarki; la plialtigo de la kotizo estis nepra, ĉar la enspezoj ne sufiĉis kovri la plej elementajn necesojn.

La presado multe plialtiĝis, pro la nova pressistemo. La sendelspezoj malplialtiĝos se vi ĉiuj kunlaboras sendante vian kotizon laŭ la rimarkoj aperigataj en la estanta numero.

Nu, ĉijare ni esperas ke post la novjaraj festoj ne forgesu pagi la kotizon kaj priokupiĝu pri la varbado de novaj membroj, tiamaniere vi kunlaboros kaj samtempe vi povos atingi premion.

Samideane, salutas vin.



# 12

La Kasisto